ESPERANTO KAJ LITERATURO

Kelkaj partianoj de Esperanto, pro la deziro ne tro ofendi la naturajn antaŭjuĝojn de la publiko, konsideras, ke nia lingvo ne estas taŭga por la literaturo kaj aljuĝas al ĝi rolon ekskluzive komercan. Al mi ŝajnas, ke tia pretendo estas tute ne pravigebla : ĉia idiomo, kiu por la literaturo ne estas taŭga, por alia rolo ankaŭ ne estas taŭga ĉar la literaturo estas la plej primitiva formo por la esprimo de la homa pensado. Estas efektive certe, ke la literaturo, kaj ĉefe la lirika poezio, estas la plej alloga kaj profunde komuna rimedo por rekte impresi niajn sentojn kaj pasiojn, sed, aliflanke, la kritiko devas konfesi, ke ĝi postulas malpli da preparado kaj kvalito ol alia formo. Ne ekzistas en la mondo ia idiomo, kiu ne estas taŭga por la poezio. La Latinoj, ekzemple, opiniis, ke la Nordaj lingvoj ne estas kapablaj por la literaturo : al tio respondas Goethe, Schiller, Heine, Sheakspeare, k. t. p. Inter la Hispanlingvanoj, estas ofte esprimata la opinio, ke la lingvo katalujna estas barbara kaj neagrabla idiomo. Aŭdinte deklamadon de kelkaj versoj en tiu ĉi lingvo, mi konfesas, ke ili estas rimarkindaj pro la riĉeco de l'formoj kaj la mirinda harmonio de l'verso. La franka verkisto Pierre Loti diris la ĉarmon de iaj poezioj de sovaĝaj popoloj, kaj la esploristo Revoil raportis pri la kortuŝo, kiun elvokis la deklamoj de negra poeto en la Afrika dezerto, malgraŭ la primitiveco kaj barbareco de la idiomo. Ne, ne ekzistas en la tuta mondo lingvo, kiu, kia ajn estas ĝia malriĉeco kaj humileco, ne povas taŭgi por la literaturo. Male, ne ĉiuj lingvoj estas kun la sama facileco alaplikeblaj al filozofio aŭ al sciencoj. Por tio, ia lingvo bezonas longan tempon de ellaborado, aŭ, se ne, la alprenon de multaj elementoj jam ellaboritaj en aliaj lingvoj. En la antikva tempo, Aristoteles, Plato, Pitagoras, Euklides, kreadis preskaŭ tutan vortaron por la esprimo de siaj ideoj aŭ specialigis multajn jam ekzistantajn vortojn kaj donis al ili pli difinitan sencon. La filozofio aŭ la sciencoj pligraviĝas kaj perfektiĝas tiujn necesegajn ilojn por la esprimo de la pensado. Kiel ajn genia estas iu moderna homo, li pri psikologio ne povas paroli sen kono de la responda vortaro : se ne rezultas nekompreneblaĵo. Filozofio, scienco kaj eĉ komerco necesigas lingvon multe pli klaran, precizan, logikan ol la poezio, al kiu estas alfarebla ia ajn idiomo. La sola afero, kiun speciale postulas pura literaturo estas bonsoneco, harmonio de l'frazo, vorta beleco. Oni volonte konfesas, ke Esperanto estas unu el la plej bonsonaj nuntempaj idiomoj kaj, sen trograndigo, ni povas diri, ke, sekve de la supraj principoj, se tiu ĉi lingvo ne povas servi al poezio, ĝi povas servi al nenio. Kiel diras la proverbo « Kio taŭgas por la plej grava, tio antaŭ taŭgas por la plej malgrava », kaj Esperanto, lingvo scienca, filozofia kaj tute racie konstruita, povas tiom pli bone esti aplikebla al literaturo kaj fariĝi, kiel ĉiaj aliaj idiomoj, lingvo literatura.

Ni cetere konsentas ke Esperanto, malgraŭ la granda kvanto de jam faritaj tradukoj, kiuj bonege montras ĝian perfektan taŭgecon por la esprimado de la sentoj kaj ideoj, ankoraŭ havas nenian notindan originalan verkon. Tamen, ne trovinte en la lingvo mem la kaŭzon de tia manko, nia konkludo estos simple, ke la majstrajn verkojn faris la geniuloj mem, kaj tiuj ne troviĝas ofte dum la vivado de ia lingvo. Apenaŭ de dudek jaroj ekzistas Esperanto : ni donu al ĝi iom da tempo ; la modernaj lingvoj tiel fieraj de sia mirinda literaturo bezonis multajn jarcentojn antaŭ ol ili povis esprimi siajn unuajn balbutojn...

P. Berthelot.

Plej bone ridas, kiu laste ridas

Duakta Komedio

Personoj : Lizo, la onklino. — Arlinjo, ŝia nevino. — Filipo, amiko de Arlinjo. — Leono, amiko de Filipo. — Alkibiado, nevo el Ameriko. — Juna fremdulino, edzino de Alkibiado.

UNUA AKTO

Sceno 1a *(La onklino kaj la nevino kudras).*

Lizo. — Nu... vi nenion diras.

Arlinjo. — Ne, mi estas malĝoja.

L. — Kion vi havas ? Nenia kaŭzo de malĝojo estas al vi... vi estas favoregata infanino...

A. — Nu, mi devas konfesi, onklinjo, ke mi ĉagrene vidas, ke vi nun malvarme akceptas nian amikon Filipo.

L. — Sufiĉas ; mi havas ian ideon pri tiu amiko.

A. — *(faldante sian kudraĵon).* Sekve, mi foriras.

L. — Ne, restu ; estas pli bone, se mi ĉion klarigos.

A. — *(residiĝante).* Mi do restu... Kio estas ?

L. — Jen, S-ro Filipo fariĝas... Kiel mi tion ĉi diros ?... Li ĝi nun estis kvazaŭ kamarado, sed...

A. — Ĉu li do jam ne estas tia ?

L. — Jes, sed, unuvorte, estas pli bone por vi ambaŭ, ke li restu iom pli ekster niaj konatoj. Oni povus kredi...

A. — Oni kredos kion ajn, sed vi havas nenian kaŭzon de riproĉo kontraŭ li.

L. — Jes, iel... mi havas ian riproĉon.

A. — Dio mia, diru rapide. Li tion verŝajne tute nescias.

L. — Vi aŭdu min. Miajn ideojn vi konas. Oni ne vivis en fremdlando dum multaj jaroj, ne ricevinte iom da sperto.

A. — Oh, sperton oni povas havi, eĉ se oni ne vivis en fremlando.

L. — Jes, eble, sed mi havas precizajn ideojn pri edukado, kaj, jen, vidu, via amiko Filipo ne havas sufiĉan edukitecon.

A. — Ne sufiĉan edukitecon..., sed mia amiko Filipo estas la plej ĝentila kaj bonedukita junulo, kiun mi konas. Via diro estas iom akra... kaj... ĉu mi povus ekscii, kio laŭ vi estas plena edukiteco ?

L. — Tio estas tre simpla. Vi scias, kiel mi ŝatas la lernadon de la lingvoj ; la lingvojn anglan, germanan, italan vi konas dank'al mi, vi havas tre zorgan edukitecon. Nu, S-ro Filipo konas nur sian patran lingvon.

A. — Vere, vi tion ĉi riproĉas al li ?...

L. — Ĉu ne sufiĉas. Supozu... tio estas nur supozo... ke li okaze fariĝu...

A. — Jes, mi komprenas, li fariĝu mia edzo.

L. — Ĉu oni povas tiele supersalti ĉiujn barilojn... Vi, bonedukita fraŭlino...

A. — *(senpacienca).* Nu, diru, onklinjo ; estas pli bone nomi la aferojn per ilia nomo, kaj se mi dirus... sed ne... fine... se li estus mia edzo, ĉu mi estus malpli feliĉa, ĉar li konas nek anglan, nek germanan ? Mi intencas paroli kun mia edzo nur per la patra lingvo.

L. — Mi konfesas, mi konfesas, sed kiam oni sidas en la societo, en certaj cirkonstancoj... en altranga societo... viro ne sufiĉe edukita...

A. — Sed, onklinjo, tio estas negrava malfacilaĵo. Filipo ja konas alian lingvon. *(ŝi batas per la manoj)* Oh, li havis ia bonegan ideon lerni Esperanton, la novan lingvon.

L. — Esperanto... tio ne estas lingvo.

A. — Kial ne ? ĝi vere estas lingvo, kaj, sen via malpermeso, mi jam de longe sekvus kurson por ĝin eklerni.

L. — Pli bone estus se vi lernus grekan lingvon.

A. — Mi diras, ke ĝi estas vera lingvo, perfekta, bonsona, riĉa, fleksebla ; ĝi eĉ havas literaturon.

L. — Ĉu estas permesate tiele frenezigi... Se vi okaze mallernus anglan aŭ germanan lingvon por prilabori tiun ĥimeron, mi vere vin senheredigus.

A. — Min senheredigus... ĉiuj malfeliĉoj pendas super mia kapo. Perdi mian karan... kaj mian heredon... *(aparte).* Mi ne scias kiel ŝin trafi... Sed, kara onklinjo, ni forlasu Esperanton kaj revenu al Filipo ; se li diris, ke li min amas.

L. — Li estus malprava kaj tio estus nepardonebla... jen, aŭskultu, mia kara.:. mi havas nevon... nevon Alkibiado.

A. — Jes, mi scias, vi diris al mi, ke vi atendas lin por la vespermanĝo, sed vi lin ne konas.

L. — Perfektan nevon, filon de mia fratino, kiu estis mirinde bela.

A. — Vi vidas, ke vi ankaŭ revas pri perfekto kaj idealo.

L. — Tio estas ne la sama... kaj la idealo estus, se vi lin akceptus kiel...

A. — Ah, sufiĉas, onklinjo ; permesu, ke mi havu koron ; cetere, ĉar via nevo parolas dialekton de Insuloj... Mi jam ne memoras, kiel vi interkompreniĝos ?

L. — Mi vere ne scias, sed li verŝajne konas anglan lingvon, ni vidos *(ŝi stariĝas)*, sed mi havas nun laboron. Arlinjo, pripensu pri ĉio tio ĉi tre zorge. Malkuraĝigu vian amanton ; mi cetere vidas lin ĉe la pordo ; mi lastafoje lasas vin kiel antaŭe, kvazaŭ kamaradoj.

Sceno 2a *(iu frapas)*

Filipo. — Ĉu vi tie estas, fraŭlino Arlinjo ?

A. — *(malfermante).* Ah, sinjoro, mi estas en bela ŝanceliĝo.

F. — Kiel, vi havas maltrankvilon ; mi ĝuste venas por serĉi vorton de espero... ĉu vi diris al ŝi ?

A. — Ke vi konfesis al mi... Ho ve, ne, ĉio estis kontraŭ mi ; ŝi volis nenion aŭdi, kaj mi elvokis tutan demandon.

F. — Ĉu la demando estis pri mi ?

A. — Jes kaj ne, ŝi diris, ke ĉar vi konas nur nian patran lingvon, vi ne povas edziĝi kun mi. Esperanton ŝi tute ne rigardas kiel lingvon.

F. — Vere, ŝi tion ĉi diris !

A. — Tion ĉi ŝi diris.

F. — Diablo ŝin prenu ; tio estas sensenca.

A. — Sed, vi scias, ke ŝi estas bona... funde.

F. — Mi scias. Ni nur favorigu ŝin, kaj la aferoj estos por ni.

A. — Se oni povus konvinki ŝin, ke Esperanto estas serioza, ŝi estus preta, mi estas certa... estas vero, ke ŝi aliparte havas nevon.

F. — Nevon, vi timigas al mi.

A. — Jes, nevon, nome Alkibiado, diablo prenu lian nomon ; li baldaŭ revenos el Portugalaj Insuloj. Mi ne scias kiel ŝi lin komprenos.

F. A. — Kion ni faros ?

F. — Estas nekredeble, kiel ĉio ŝanĝiĝas en unu tago. Tondro en blua ĉielo... mi jus intencis mendi fianĉan bukedon.

A. — *(plorante).* Gi estas abismo, abismo.

F. — Kiel ni forpelos tiun malfacilaĵon. Amiko Leono estus tie utila ; li estas konsilema... kaj sprita. Nu, li ĝuste pasas apude... Mi voku lin, se al vi plaĉas.

A. — Jes, faru ; mia onklino estas ekstere... en gravaj situacioj, oni uzu gravajn rimedojn.

F. — *(vokante)* He, amiko Leono, alvenu, granda danĝero.

Sceno 3a

Leono. — Mi alkuras, kion mi volas, ĉu brulas ?

F. — *(montrante la koron)* Tie ĉi brulas.

L. — Kiel, viaj aferoj iras malbone. En kio mi povas utili ?

F. — *(prenante lian brakon).* Vi povas esti nia savanto.

A. — *(prenante la alian brakon)* nia saveganto.

L. — Se vi min prenas ĉe la brakoj, ni triope dronos. Klarigu, kio estas.

F. — Arlinjo, klarigu al li... Okazis, ke Esperanto utilas por nenio... ke nevo alveturos...

L. — Tio estas malklara. Vi disrevas...

A. — Mi parolu... jen... Mia onklino ne konsentos pri mia edziniĝo kun S-ro Felipo, ĉar li konas nur sian patran lingvon. Laŭ ŝiaj principoj bona edukiteco postulas la lernadon de la lingvoj ; ŝi eĉ ne konsentas, ke Esperanto, kiun Filipo perfekte konas, servas por io... kaj plie... ŝi havas nevon, pri kiu ŝi havas planojn, vi komprenas. Oh, savu nin, savu-nin.

L. — Aĥ ! jen ankoraŭ malamikino de nia internacia lingvo... Atendu, nur por tio, mi ekludos kun ŝi ; kaj mi devigos ŝin konfesi, ke nia helplingvo havas valoron.

A. — Se vi povus pruvi, ke ĝi estas komprenebla kaj uzebla de lando al alia...

L. — Tio venos... Kie estas tiu nevo ?

F. — Li baldaŭ venos... Li veturas el Patagoniaj insuloj. Lia nomo estas Alkibiado.

L. — *(pripense promenas).* Mi baldaŭ tenos mian planon... Nu, vi Filipo foriru al via hejmo, tiel ke ni povu vin voki. Mi revenos tien ĉi kvazaŭ mi estus Alkibiado... Jen, mi havas mian planon, kaj vi vidos, ĉu hodiaŭ vespere, ŝi ne donis sian konsenton kaj promesis, ke ŝi lernos Esperanton.

F. — Vi estas geniulo...

L. — Vi min gratulos poste. Ne timu ; se ĉio malsukcesas, oni rekomencos.

F. — Sed kian rolon mi devos ludi ?

L. — Vi respondos al mi Esperante ; neniam la onklino eltrovos tian ruzon tiel rapide preparitan. Vi, fraŭlino Arlinjo, enmetu tiun letereton en la leterkeston. Ĉe sia reveno, via onklino ĝin trovos. Mi mem venos en la taŭga momento, kaj vi lasu nin agi. *(Ili malaperas)*...

A. — Mi ja ne volus partopreni en tia implikaĵo, sed kiam la koro batas...

(Kurteno).

(Daŭronta) S-ino Houriet.

TRA LA

ESPERANTA LITERATURO

Ombroj

Novelo de *Boleslav Prus.*

Kiam la briloj de l'suno estingiĝas sur la ĉielo, de tero leviĝas la krepusko. La krepusko — la granda nokta armeo de miloj da nevideblaj taĉmentoj kaj milionoj da batalistoj. Potenca armeo, kiu de nememoreblaj tempoj batalas kontraŭ la mondo, forkuras ĉiumatene, venkas ĉiuvespere, regas de la leviĝo ĝis la subiro de l'suno kaj tage, rompita, kaŝas sin en nestoj kaj atendas. Gi atendas en la montaj profundaĵoj kaj en la keloj de l'urboj, en la arbaraj densaĵoj kaj en la lagoj mallumaj. Gi atendas kaŝante sin en la eternaj kavernoj de l'tero, en la minejoj, en la kavoj, en la anguloj de l'domoj. Distrita kaj ŝajne forestanta, ĝi tamen pleniĝas ĉiujn kaŝejojn. Gi estas en ĉiu fendo de l'ŝelo de l'arboj, en la faldoj de l'homa vesto, ĝi kuŝas sin sub la plej malgranda sablero, kroĉiĝas je la plej maldika aranea fadeno kaj atendas. Timigita en unu loko, ĝi tuj transiras en alian, uzante ian okazon por reveni tien, de kie oni forpelis ĝin, por surrampi neokupatan postenon kaj superverŝi la teron. Kiam la suno estingiĝas, la armeo de krepuskoj en densaj taĉmentoj eliras el siaj kaŝejoj, mallaŭta kaj singardema. Gi pleniĝas la koridorojn de la domoj, la vestiblojn kaj la malbone lumigitajn ŝtuparojn, ĝi forlasas sian postenon sub la ŝrankoj kaj tabloj, elrampas en la mezon de la ĉambroj kaj sidiĝas sur la kurtenoj ; per la ventoliloj de la keloj kaj per la fenestraj vitroj ĝi elŝovas sin en la stratojn, en surda silento ĝi atakas la murojn, la tegmentojn kaj subatendante sur la pintoj, ĝi restas trankvila, ĝis okcidente paliĝos la ruĝaj nubetoj. Ankoraŭ unu momento kaj subite leviĝos grandega malluma eksplodo, kiu atingos la ĉielon. La bestoj kaŝos sin en la nestojn, la homo forkuros hejmen ; la vivo kiel la planto sen akvo, kuntiriĝos kaj komencos sekiĝi. La koloroj kaj formoj disfluos en neesto ; la timo, la eraro kaj la krimo ekregos la mondon.

En tiu momento sur la malpleniĝantaj stratoj de Varsovio aperas stranga homa kreitaĵo kun malgranda flameto super la kapo. Li rapide kuras tra la strato, kvazaŭ lin persekutus la mallumoj, li haltas apud ĉiu lanterno unu momenton, kaj ekbruliginte gajan lumon, li malaperas, kiel ombro. Kaj tiamaniere ĉiutage. Ĉu sur la kampoj la printempo parfumas ĉion je la bonodoro de la floroj ; ĉu bruegas julia fulmotondro, ĉu aŭtunaj ventoj disblovas sur la stratoj polvajn nebulojn ; ĉu en la aero flugas vintraj neĝoj — li ĉiam, kiam venas la vespero, trakuras kun sia flameto la stratojn, ekbruligas la lumon kaj poste malaperas, kiel ombro.

De kie vi devenas, homo, kaj kie vi kaŝas vin, ke ni ne konas vian vizaĝon, nek aŭdas vian voĉon ? ĉu vi havas edzinon aŭ patrinon, kiu atendas vian revenon ? Aŭ infanojn, kiuj stariĝinte en angulo vian lanterneton, surrampas viajn genuojn kaj ĉirkaŭprenas vian kolon ? Ĉu vi havas amikojn, al kiuj vi rakontas pri via feliĉo aŭ nesukceso, aŭ almenaŭ konatojn, kun kiuj vi povus paroli pri ĉiutagaj aferoj ? Ĉu vi posedas hejmon, kie oni povus trovi vin ; nomon, per kiu oni povus vin voki ; bezonojn kaj sentojn, kiuj farus vin tia homo, kiel ni ? Aŭ ĉu vi vere estas senforma estaĵo, muta kaj nekomprenebla, kiu aperas sole en la krepusko, ekbruligas la lumon kaj poste malaperas, kiel ombro ?

Oni respondis al mi, ke li vere estas homo, oni eĉ donis lian adreson. Mi iris tien kaj demandis la pordiston : — « Ĉu loĝas ĉe vi la homo, kiu ekbruligas la lanternojn sur la stratoj ? » — « Ĉe ni ». — « Kaj kie ? » — « En tiu ĉambreto ». La ĉambreto estis fermita. Mi rigardis tra la fenestro, sed mi vidis sole simplan liton apud la muro kaj la lanterneton sur alta bastono. La lanternisto forestis. — « Almenaŭ diru al mi, kia estas lia mieno ? » — « Kiu povas scii ? » — respondis la pordisto, levante la ŝultrojn. « Mi mem ne konas lin bone » — li diris — « ĉar tage li neniam estas hejme ».

Post duonjaro mi venis duan fojon.

« Ĉu hodiaŭ la lanternisto estas hejme ? » — « Ho ! » diris la pordisto, « li ne estas kaj ne estos. Hieraŭ oni enterigis lin. Li mortis ». — La pordisto enpensiĝis. Demandinte pri kelke da detaloj, mi forveturis tombejon. « Montru al mi, tombisto, kie oni hieraŭ enterigis la lanterniston ». — « Lanterniston ? »... li ripetis. « Kiu povas scii ? Hieraŭ oni alveturigis tridek mortintojn. » — « Sed li estas enterigita en la parto por la plej malriĉaj homoj ». — « Alvenis dudek kvin tiaj ». — « Sed li kuŝis en nekolorita ĉerko ». — « Oni alveturigis dek ses tiujn ».

Tiamaniere mi ne vidis lian vizaĝon, mi ne aŭdis lian nomon, mi ne trovis lian tombon. Kaj li restis post la morto, kia li estis dum la vivo : estaĵo videbla sole en la krepusko, muta, senforma kiel ombro. En la krepusko de l'vivo, kie la malfeliĉa homaro eraras palpe, kie unujn rompas la malhelpoj, aliaj falas en profundaĵon kaj neniu scias certan vojon ; kie la malfeliĉo, mizero kaj malamo ĉasas la homon, ligitan per la superstiĉoj, — ankaŭ en mallumaj vojoj de l'vivo rapidas lanternistoj. Ĉiu portas super la kapo malgrandan flameton, ĉiu ekbruligas lumon sur sia vojeto, vivas nekonata, laboras neŝatata kaj poste malaperas, kiel ombro.

El la lingvo polas tradukis
Dro *Kabe.*

12 AUGUSTO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ (4 Spesdekoj) TRIA JARO. — No 13

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO

Unu Jaro . . . . Sm. 1.20 | Helpabono. . . . Sm. 4.—

1 Spesmilo (Sm.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = ½ dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj austr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).

Oni abonas ĉe la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

Bulgara Eldono : N. B. Kovaĉef, Sofio

REKLAMO

1 paĝo	Sm. 100.—	¼ kolono	Sm. 7.—
1 kolono	» 25.—	⅛ »	» 4.—
½ »	» 13.—	1/16 »	» 2.50

25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj : G. Warnier, 46, Rue Sainte-Anne, Paris-2e
C. A. L. Browne, 53, Wych Street, London W. C.

LA TRIA KONGRESO

Kiam aperos tiuj ĉi linioj, la tria kongreso de Esperanto jam estos realaĵo. Tra la Angla Universitata urbo zumados la diverslanda anarego Esperantista ; en multaj ĉambroj laŭtiĝos la sonoj de nia lingvo, bruos la aplaŭdoj, ĝojiĝos la festoj, dum en la malgrandaj kunvenoj, diverslandanoj kunigitaj per ia sama celo intime laborados, disrompinte ĉiujn « jarcentajn barilojn ». Dum la daŭro de kelkaj tagoj, Esperantujo estos vivanta efektivaĵo.

Niaj legantoj jam eksciis, ke la malfacilan, penigan taskon, kiun necesigas la organizo de tia kongresego, prenis sur sin la de nun fama Trio por la Tria, kiu tiel lerte kaj bonege aranĝis la aferojn, ke nia kongreso, oni antaŭdiris, estos epokfaranta kongreso. Pri la sukceso ni povas esti jam antaŭe tute certaj, ke ĝi estos plene atingita, unue ĉar la estinteco jam montris la reciprokan sinentuziasmiĝon kaj senlacan fervoron, kiujn naskas tiaj elmontradoj, due ĉar ni pri la praktika organizado — esenca kondiĉo de senmanka sukceso — plene fidas al la lerteco kaj zorgemeco de niaj Britaj samideanoj. Sed ne estas sufiĉe, ke ni brue sukcesas kaj per tia bruado elvokas la sciemecon de la publiko ; estas ankaŭ necese, ke el nia kongreso rezultu utila, fruktodona laboro, kies nerektaj sekvoj faros la plej bonan propagandon, kiun oni povas elpensi. Estis iam la tempo, kiam, antaŭ la Kongresoj, la Esperantistoj multe disputadis pri demandoj koncernantaj organizadon, komunan propagandon, k. t. p. ; la sperto montris, ke nuntempe tiaj demandoj fariĝas pli kaj pli ne tiel ĉefgravaj kiel antaŭe. La estintaj kongresoj — kaj certe ankaŭ la estontaj — montris, ke nia afero, enirante sur la vojo praktika, specialiĝas kaj diversfakiĝas. Tio estis la precipa karakterizo de la Geneva kongreso. Flanke de la gravaj kunvenoj, kiuj tre certe kaŭzas profundan impreson al la publiko, sed ĝenerale sekvigas nenian gravan rezultaton, okazis multaj specialistaj kunvenoj, ĉe kiuj diverslandaj samfakanoj societe kuniĝis, unue por diskonigi nian lingvon ĉe tian specialan fakon, due por uzi ĝin por sia propra utilo kaj instigi al ĝia uzado. La pura propagando jam ne estas la sola celo de nia penado ; al ĝi ni aldonas nun la tujan utiligadon de Esperanto. Ni do deziru, ke, dum la Tria Kongreso, okazu ekster niaj kunvenegoj esence difinitaj por propagando, multaj, multegaj el tiaj specialaj kunvenoj, kiuj estas la kvazaŭa skizo de la venonta homaro esperantistigita. Ni deziru, ke la societoj kiuj estis nur iniciatitaj kaj ekfonditaj en Genevo definitive organiziĝu en Kembriĝo kaj alprenu planon de agado, kiun ili povos efektivigi dum la venonta sezono esperantista. Ni deziru ke la delegitoj de la peresperantaj organizaĵoj, kiel konsuloj, Esperanto-Oficoj, k. a, fortikiĝu per komuna konsiliĝado kaj fariĝu de nun efektive laborantaj kreaĵoj. Jen staras tie ĉi granda tasko, kies realiĝo estos por nia afero la fonto de novaj sukcesoj, tiom pli certaj, ke ili havos praktikan fundamenton. En Genevo, ĉe la ombro de la vasta arbego de Esperantismo, ni dissemis multajn ĝermojn ; ni nun kreskigu kaj florigu tiujn samajn ĝermojn, tiel ke ili siavice fariĝu vivoplenaj arboj.

***

Ni povas antaŭdiri, ke nia kongreso ekscitos grandan famon, sed tiun famon ne ni mem ĝin elvokas, sed ja pli potenca ilo, kies nomo estas gazetaro. Ni zorgu ke pri nia kongreso kaj ĝiaj rezultatoj parolu ĉiuj gazetoj, grandaj aŭ malgrandaj ; se bezone, ĉiu kongresano fariĝu mem gazetisto kaj konigu la notindajn okazojn de la Kongreso al la granda publiko. Tia eksperimento, kia nun estas farata en Kembriĝo, estas bonega okazo por rebati kaj forpeli per nedisputeblaj pruvoj multajn erarojn, kiuj malgraŭ nia insista penado diskuras la tutan jaron de ĵurnalo al alia. Neniam ni tro ripetos la konvinkantajn pruvojn, kiujn per si mem havas niaj kongresoj. Al ni mem povas ŝajni, ke tiaj faktoj pro sia jama okazinteco kaj ripetiteco jam perdis sian originalecon, sed al la personoj, kiuj staras ekster nia movado kaj pri ĝi scias nur tre malprecize, tiaj faktoj, kiaj la uzo de unu sola lingvo por Kongreso kuniganta plej diversajn nacianojn, la parolateco de nia lingvo, la ekzisto de multaj internaciaj societoj ĝin praktike uzantaj, ŝajnas novegaj kaj apenaŭ kredeblaj. Tro longe ni por nia propagando devis kontentiĝi nin per teoriaj kaj al la pura prudento sinturnantaj argumentoj ; nun, ni havas ŝatindan kolekton de faktoj, kiuj montras la vivecon de nia entrepreno ; ni sciu ĝin valorigi.

Se ni volus paroli pri la propra utileco de niaj kongresoj, ni povus atentigi pri la lingva punkto, pri tiu viva buŝa uzo de Esperanto, per kiu nia lingvo fariĝas vere vivanta idiomo, unueca, memstaran spiriton havanta, per kiu foriĝas ĉe la kunestado de centoj da diverslandaj samideanoj ĉiuj idiotismoj, ĉiuj malregulaĵoj, ĉiuj nematuraj esprimoj kaj ne plene kompreneblaj formoj, kaj flugante al pli altaj regionoj, ni povus paroli pri la sento de kora frateco, de interpopola konsento, kiun naskas niaj kongresoj, kie la diversdeveneco de la batalantoj malaperas antaŭ la samceleco de niaj penadoj. Tion ĉi baldaŭ spertos la Esperantistoj kunvenantaj en Esperantujo kaj pri tio baldaŭ aŭdos tiuj, kiuj ne povis ĉeesti en nia festado, ĉar al tiuj ĉi ankaŭ ni devos multe pensi dum la Kongreso. Ni nun fariĝu kaptitoj de Esperanto en Esperantujo kaj de Esperanto ni restu kaptitoj ankaŭ post la Kongreso, kiam rekomenciĝos la bona laboro.

H. H.

TRA LA MONDO

Granda Britujo

Londono, Aŭgusto 1907.

Gis nun ekzistis nur du Anglaj klasikaj partioj, kiuj sinsekve anstataŭiĝis sin unu per la alia por la ekzercado de la regada potenco : la partio liberala kaj la partio konservativa. La tuta Angla politika vivado konsistis en la batalado inter tiuj du partioj, kies ideoj estis reciproke defenditaj de gloraj talentuloj. Nur de kelka tempo, naskiĝis tria partio, nome la partio laborista (Labour Party), kies plimulto estas enpenetrita per socialistaj aŭ socialismemaj ideoj. Oni scias, ke ĉe la balotado de la Parlamento komunuma, la laborista partio prosperis ricevi atentindan nombron da deputatoj ; plie, en izolaj balotoj, ili neatendeble venkis la aliajn partiojn. En tiu rilato, la lasta baloto de Corne Valley (Jorkshire) estas karakteriza. Tiu loko estis konsiderita kiel unu el la plej certaj fortikaĵoj de l'liberalismo. Tio ŝajnis tiel ne diskutebla, ke la ministraro elektis la tiean deputaton por la ĉambro de l'nobeloj. Tiamaniere, ĝi opiniis, ke estos plia liberalulo ĉe la nobeloj kaj plia ĉe la komunumoj. La rezultato de la baloto tute erarigis tiun kalkulon. La socialista kandidato estis elektita, kontraŭ la liberala kaj la konservativa. Tio estas tiom pli signifa, ke la liberala kandidato estis filo de John Bright, kiu estis siatempe unu el la ĉefoj de l'liberalismo kaj fervora liberŝanĝisto. Estas vero, ke en Anglujo, la voĉdono per absoluta plimulto ne ekzistas. La kandidato, kiu ricevas la plej grandan nombron da voĉoj estas elektita, eĉ se tiu nombro ne superas la duonon de la voĉoj esprimitaj. Tia sistemo estis komprenebla, kiam ekzistis nur du partioj, sed nuntempe montriĝas tria partio kaj oni sin demandas, ĉu oni ne devos reformi nian balotsistemon, enkondukante la absolutan plimulton ĉe la unua baloto. Malgraŭ sia grava plimulto en la Parlamento, la nuna liberala registaro ne ŝajnas enradikigita. Tiu registaro, ĉe sia alveno al la supera potenco, promesis multajn reformojn. Nun ĝi proponas plibonigojn, kiuj, pro sia nesufiĉeco kaj timeco, kontentigas neniun, tiel ke la liberaluloj moderaj emas al la konservativuloj kaj la plej radikalaj al la socialistoj. Ekzistas nun tridek unu laboristaj deputatoj en la Parlamento ; la triono estas vere socialista. Kvankam la tri frakcioj de la laborista partio, nome socialista, sindikata, radikala havas malsamajn ideojn pri multaj punktoj, ili dum kelka tempo restas sufiĉe konsentaj por ke oni povu konsideri la partion kiel unu. Fakte, okazas nun en la Angla politika vivado kio okazis en la politiko de la aliaj nacioj : la pure politikajn demandojn prezentitajn de la malnovaj partioj anstataŭas nun la ekonomiaj demandoj kun novaj partioj kaj novaj formuloj, sed en nia lando pli ol ĉie la pezo de la kutimoj estas grandega kaj daŭros longa tempo antaŭ ol la novaj ekonomiaj socialistaj ideoj estos enradikigitaj, escepte se ili sukcesas alkonformiĝi al la spirito de la Angla vivado kaj historio.

L. H. G.

Hungarujo

Zemuno, Aŭgusto 1907.

Mi rimarkis en mia lasta letero, ke mi estas havigonta ankoraŭ kelke da priskribindaj scenoj el mia vojaĝo. Laste, mi parolis iomete pri Beogrado, la pordo de Balkanujo ; nun mi volas rakonti la grandan foiron en Zemuno. Okazas ĉiujare du grandaj foiroj en ĉi tiu lasta urbo de Hungarujo. En la urbo mem, ni trovas hungarojn, germanojn, kroatojn, serbojn, rumanojn, ciganojn, hebreojn, bosnjakojn. Sed dum la foiro plimultiĝas tiu diverseco de popoloj. Venas albanoj, dalmatoj, kelke da turkoj kaj multe da nuancoj de ciganoj. Estas vera ĝuo por iu etnografiisto promene trapaŝi ĉi tiun foiron. Jam kelke da tagoj antaŭ la foiro, senlacaj manoj konstruas sennombrajn butikojn, provizorajn lignajn ejojn, k. t. p. ; ĝis alvenas la granda tago (tago, kiu kutime daŭras 3-4 tagojn !) ĉiu angulo de la venda kampo jam estas plena de multkolora amaso de ĉevaloj, homoj, veturiloj. Mi unue nomis la ĉevalojn, ĉar ilin oni ekrigardas antaŭ ĉio. Jam de malproksime aŭdiĝas orelŝira bruado, kriado, tintado, murmurado, fratiĝantaj en nepriskribeblan ĥaoson. En la komenco de la foirejo oni ekrigardas la malgrandajn ciganidojn, kiuj ne ellasas bone vestitan homon ĝis oni ĵetis al li unu heleron ; eĉ ili kun siaj belaj grandaj nigraj okuloj estas kapablaj alian heleron « elvidi » el la poŝo. Poste grupiĝis la belegaj ciganinoj pentrinde vestitaj. En la riĉaj ondoj de siaj noktnigraj haroj ili portas arte enmetitajn florojn, en la oreloj ili havas grandajn neniam viditajn orientajn juvelojn. Ili krias amikajn « Devleea'jn » (adiaŭ) al la promenanto. Poste aperas la estro de ciganoj, la « Vajda », bela granda viro, kun karbonnigra barbo. Sur la veŝto li portas proksimume 24-28 grandegajn arĝentajn butonegojn. En lia mano estas bastonego. La ciganoj atendas kion li diros. Estas vere rimarkinde, ke la ciganoj, kiuj tutjare nur fivivas el almozo kaj ŝtelado, nun ĝuas la tutan ĝueblecon de l'festo. Sed ni iru pli internen. Post kelke da paŝoj ni vidas la nacivestitajn serbajn virgulinojn, kiuj emas edziniĝi. Ili portas siajn havaĵojn ofte fakte, ofte nur simbole sur siaj koloj, tio estas ŝnuro sur kiu ili surbindis grandajn ormonerojn. El tio la serba edziĝema junularo povas ekvidi la riĉecon de la kandidato-fianĉino. (La metodo estas tre praktika). Ni baldaŭ troviĝas en la mezo de l'foirejo. Dekstre, estis konstruaĵo de ia dalmato, kiu kante kaj krie prezentis siajn vendotaĵojn, nome tabakujoj, cigaredujoj kaj poŝtranĉiletoj. Poste ni renkontiĝis kun konata tipo de foirvendisto de urbaj vestoj. Malgranda viro kun ruĝa dika vizaĝo deklamis laŭ teatra sintenado. Li proponis provon per sia fabrikaĵo, iam kvinlingve parolante kaj ofte fajfante. Se jam sufiĉa nombro de homoj kolektiĝis ĉirkaŭ li, li komencis sian ĉarlatanaĵon : « Urvraim jošimamjošimam jedan kravatnadel, jedan cigarelttenŝpice », unutempe hungare, kroateserbe kaj germane, elkraĉante la vortojn kaj li metis ne direblajn objektojn en skatoleton, fulmorapide dirante « unu tranĉilo », « unu okulvitro », « cigaredingo », duono de okulvitrujo », « krajono », « libreto » kiam la skatoleto estis plenigita per senvaloraj objektoj, tiam li denove kriis : « kaj tiuj multvaloraj, utilaj, bonaj, uzeblaj objektoj ne kostas 25 frankojn, ne 10, ne 5, ne 2, ne 1, nur 99 centimojn ! » k. t. p. Sed poste la promenado ne estas jam facila, ĉar la vizitantoj multiĝas, tiel ke mi nur malrapide povas daŭrigi la iradon. Tie oni mortigis per tranĉilo senkulpan porkidon por ĝin baki. El la najbara drinkejo nuntempe aŭdiĝas simpla, sed belega nacikanto de serbaj « guzlic-istoj » kaj « tamburaĉ-istoj » (la unua instrumento similas al violino, la dua al mandolino), akompanante de nazĝuiga bonodoro de diversaj serbnaciaj viandmanĝaĵoj. Tiuj estas la « ŝebabĉis » kaj la « razliĉe » (mi fonetike skribas). La unua estas viandvermiĉelo bakita sur rostaĵo, la due estas viandpecoj bakitaj en ardo. Sume, oni jam trapikis la supre priskribitan porkidon, kiu baldaŭ fariĝis bona invitilo por gastoj, kaj ĉe la manĝejoj sidiĝis homoj por pretiĝi al manĝado. Ne malpli interesa estas la grupoj de seriozaj turkoj kaj rumanoj. Sed vespere ankaŭ ne ekdormas la vivo, ĉar la gejunularo prenis sur sin la ĉefan rolon. Tie mi vidis la sekvantan ludon, kiun mi ankoraŭ nenie trovis. Kiam la suno jam malaperis de la horizonto, kaj nur la ruĝa ĉielo montris sian ĉiam pli kaj pli malfortiĝantan postsignon, ĉie ekbrulis modestaj kandeletoj kaj kiel lumskaraboj bele briletis en la nokto. La gejunuloj, fidelaj virinoj, knabinoj kaj bonhumoraj viroj kaj knaboj jus komencis promenadi. En sia mano ĉiu havis grandan kuirkuleron, per kiu ili mokante tuŝis la dorson de la renkontatoj. Tie oni amuziĝis ĝis la kandeloj forbrulis, kaj la vivo kuŝiĝis ĝis la alia tago, kiam ĉio kun freŝa forto estos daŭrigata.

Tie mi estis kaj bone amuziĝis ĝuante la veran, senmakulan popolanimon. Sed mi ne povis lasi la aferon sen rimarko, ĉar al mi montriĝis la malfacileco de la diverslingveco, kiu ĉiam malhelpas tian kaj saman feston, kie renkontiĝas diversnaciaj popoloj.

A. de Marich.

Svisujo

Berno, Aŭgusto 1907.

Oni diras, ke Svisujo estas la lando de la Societoj. « Ĉiufoje kiam tri Svisoj kuni-

ĝas, ili fondas societon », pretendis iu vojaĝisto. « Tri Svisoj renkontiĝas, jen ili faras popolon », diris Victor Hugo. Kio ajn estas, se Svisujo naskas multajn societojn, tiuj societoj siavice naskas multajn festojn, kaj oni tiel same bone povus diri, ke Svisujo estas la lando de l'festoj. Inter tiuj festoj, mi celas paroli nur pri tiuj ĉi, kiuj estas la plej karakterizaj nome pri la naciaj festoj. Ĉiujare, okazas en ia Svisa urbo granda nacia festego, kiu kunveniĝas samfakanojn el ĉiuj kantonoj kaj sekvigas grandan bruon. Tiuj ĉi festegoj celas alterne kanton, gimnastikon kaj pafadon, tiel ke ĉiutrijare, en malsama urbo, okazas nacia festo de kanto, nacia festo de gimnastiko, k. c. Tiun ĉi jaron okazis en urbo Zuriĥo, la plej granda Svisa urbo, la nacia festo de Pafado aŭ pli ĝuste la Federala Pafado, laŭ la tiea nomo. Pafado estas esence Svisa sporto kaj oni rememoras, ke en ĉia internacia turniro ĝis nun okazinta, la Svisaj pafantoj konkure venkis la alinaciajn pafantojn. La festo de tiu ĉi jaro ricevis plej brilan sukceson ; grandegaj popolamasoj vizitis urbon Zuriĥo kaj la feston favoris belega vetero. Kompreneble, estis ankaŭ organizitaj multaj flankaj distrajoj, festetoj, festenoj kun senĉesaj paroladoj kaj tostoj. La pafiloj ankaŭ fervore laboradis ; ĉe la internacia turniro, la Svisoj estas ĉe la unua vico ; poste venas la Belgoj, la Francoj, la Argentinanoj, k. a. Plie, oni fondis internacian Unuiĝon de Pafistoj, kies venonta konkurado okazos en Vieno.

Post pafado oni sendube povas paroli pri armeo. La federala Parlamento estis antaŭ nelonge akceptinta novan leĝon pri organizado de armeo, laŭ kiu la tempo de militservado estas iom plilongigita. De tiu nova leĝo rezultos ankaŭ pligravigo de la armeaj elspezoj, jam sufiĉe gravaj, se oni konsideras la malvastecon de nia lando. Laŭ la federala konstitucio, ĉiu leĝo akceptita de la Parlamento estos metata al la popola voĉdonado, se almenaŭ 35.000 regnanoj ĝin postulas en la templimo de tri monatoj post la akcepto. Tiun ĉi rajton oni nomas referendumo. Kontraŭ la nova leĝo pri armeo, postulis la referendumon proksimume 90.000 regnanoj. Tiu ĉi referendumo estis organizita de la socialista partio kaj apogita de kelkaj konservativaj kaj tre federalistaj elementoj ; ŝajnas ankaŭ ke aliaj partianoj kunhelpis al la sukceso de tiu referendumo, sendube pro la timo, ke la nova leĝo pligrandigos la armeajn devojn. Sekve, kvankam la leĝo estis preskaŭ unuvoĉe akceptita de la Parlamento, pri ĝi definitive decidos la Svisa popolo. La voĉdonado okazos en aŭtuno kaj la antaŭbatalo baldaŭ komenciĝos. Nur la socialista partio estas firme kontraŭ tiu leĝo, sed de la fakto ke la aliaj partioj ĝin apogos oni ne povas eltiri la konkludon ke ĝi estos akceptata, ĉar la obeemo al la ordonoj de ia partio estas tute ne ĝenerala, ĉefe kiam leĝo tiel proksime koncernas ĉiun regnanon.

Antaŭ kelkaj semajnoj, la Geneva kantono efektivigis gravan reformon. La regnanoj akceptis la leĝon pri la apartigo de la eklezioj kaj de l'Ŝtato. En tiu kantono, ekzistis du eklezioj ŝtataj : la protestanta nacia eklezio fondita de Kalvino ; la nacia katolika eklezio, fondita en 1873 dum la movado nomita Kulturkampf. Tiu ĉi lasta eklezio, kiu ne akceptis la Romajn dogmojn de 1870 kaj estas liberala, tute ne sukcesis. Inter la liberaj eklezioj, oni kalkulas la Romkatolikan eklezion kaj diversajn protestantajn ekleziojn. La apartigado estis akceptita de la socialistoj, de la Romkatolikoj, de parto de la radikaloj kaj de multaj protestantoj, kiuj konsideris ke la nuna situacio ne estas favora al la disvolvado de la eklezioj. Tiu decido estis tute ne atendita kaj kaŭzis grandan miron. La fama eklezio fondita de Kalvino jam ne ekzistas kiel ŝtata eklezio. Mi uzas la okazon de tiu kroniko por diri, ke la leĝo pri malpermeso de la vendado de absinto, pri kiu mi aludis en estinta artikolo, estis ankaŭ akceptita de la Geneva popolo post akra batalado.

Nuntempe, dum la somera varmeco, la svisaj montoj estas ĉiuflanke atakitaj de fremdaj turistoj. La hoteloj pleniĝas, la montaro fariĝas homoplena dum kelkaj mallongaj semajnoj, ĝis la baldaŭa aŭtuno revokos ĉiujn okazajn montanojn al la laborado kaj la montoj denove sidados en silentado.

A.

Tutmonda Kroniko

Julio 16, Bostono. — Eksplodo de la Usona militŝipo *Georgia* ; 8 mortintoj, multaj vunditoj.

Tiflizo. — Oni inside mortigas G-lon Glieboff.

17, Romo. La Vatikano publikigas novan Silabuson.

Parizo. — Mortas pentristo Chartrant.

18, Palermo. — Manifestadoj pro la aresto de Nasi.

19, Parizo. — Mortas verkisto Hector Malot.

Koreujo. — La imperiestro demetas la reĝecon por sia filo Yi-Siek. Ribelado kontraŭ la Japanoj.

20, *Detroit* (U. S. A.). Fervoja ektuŝego ; 48 mortintoj, 60 vunditoj.

Belgrado. — Oni fermas la Parlamenton.

Maroko. — La senditoj de la Sultano al Raisuli estas ofenditaj.

22, Romo. — Inaŭguracio de monumento al Papo Leono XIII.

Maroko. — En Meliño, batalo inter la soldatoj de la Sultano kaj la Raisulanoj.

23, Romo. — La Senato aprobas la areston de Nasi.

25, Japanujo. — Oni publikigas novan traktaton inter Koreujo kaj Japanujo.

Napolo. — Mortas pentristo Luigi Fabron.

28, Nov-Jorko. — Insulo Coney-Island estas detruita de brulado.

Bergen. — Imperiestro Vilhelmo II vizitas eksimperiestrinon Eŭgenino.

31, Casablanca (Maroko). — La enlanduloj inside mortigas 10 Eŭropajn laboristojn.

Belfast. — Striko de la policanoj.

Londono. — La Parlamento aprobas la proponon doni duonmilionon da spesmiloj al Lordo Cromer por liaj servoj en Egiptujo.

Hago. — Oni metas la unuan ŝtonon de la palaco de l'paco.

Aŭgusto 1-2, Italujo. — Manifestadoj antiklerikaj.

A. Tellini.

ESPERANTO PRAKTIKA

Akcia Societo Esperanto

La fonda kunveno de la **Anonima Akcia Societo Esperanto** *okazos en Cambridge, Mardon la 13an de Aŭgusto.* Oni sciigos, dum la Kongreso, pri la ĉambro kaj la horo. La mendintoj de akcioj ricevos en la komenco de tiu monato, la projekton de regularo kun necesaj informoj.

Oni povas ankoraŭ mendi akciojn, ĉar, verŝajne, la proponita kapitalo estos iom altigita.

(Vidu No 9 de *Esperanto*).

Publikaj Esperanto-Oficoj

La *Delegitoj* de la jam ekzistantaj **Publikaj Esperanto-Oficoj** kaj la personoj, kiuj *intencas fondi* tiujn Oficojn en sia urbo, estas insiste petataj *ĉeesti* **la kunvenon, kiu okazos dum la Tria Kongreso en Cambridge** la **13an de Aŭgusto** (ĉambro kaj horo sciigotaj dum la Kongreso).

Oni ne forgesu, ke Publika Esperanto-Ofico povas esti kreata en urboj, kie estas nur unu Esperantisto.

Tagordo de la kunveno :

1e) Klarigo pri la celo de la P. Esp.-Of. (raportanto S-ro Th. Rousseau, Bourg).
2e) Fondado de la Esp-Oficejoj (afiŝejo, Esperantista vendejo, k. c.) en kiel eble plej multe da urboj.
3e Organizado de la P. Esp.-Of. Servoj farataj de ĝi.
4e) Alpreno de komuna adreso.
5e) Elekto de komuna jurnalo.
6e) Diversajoj.

Dum la kunveno oni disdonos demandaron sur kiu la delegitoj de ĉiu P. Esp.-Of. bonvolos skribi la informojn petatajn pri ilia P. Esp.-Of.

La personoj, kiuj interesiĝas pri tiu temo kaj deziras instigi la kreon de P. Esp.-Of. en sia urbo estas kore invitataj. Ni esperas, ke multaj personoj ĉeestos tiun kunvenon, kiu povas liveri praktikajn kaj tre utilajn rezultatojn.

HELPA MONO

La sistemo de Internacia Helpa Mono, elpensita de S-ro R. de Saussure kaj priskribita de li mem en no 8a de ESPERANTO jam ricevis ŝatindan nombron da aproboj. Multaj gazetoj favore raportis pri ĝi kaj kelkaj el niaj Esperantaj kunfratoj ĝin ekuzis en siaj revuoj. Inter la Esperantaj gazetoj, kiuj uzas la Helpan Monon ĉu en siaj anoncoj, ĉu en la teksto, mem, oni povas citi : *Internacia Scienca Revuo, Esperanto, Lingvo internacia, Espero katolika, Tra la Mondo, Belga Sonorilo, Casopis Esperantistú, Germana Esperantisto, British Esperantist, Svisa Espero,* k. t. p. ; ĝi ankaŭ estas uzata en la diversaj kongresaj eldonajoj de la *Trio por la Tria*, en kiuj la prezoj estas markitaj per nacia angla mono kaj per internacia. Tio estas grava kaj utila simpligo. Plie, ni povis konstati, ke jam multaj personoj uzas tiun sistemon en siaj korespondajoj kun « alimonuloj ». En tre malmulte da tempo, la helpa mono jam eniris la vojon praktikan. Tio pruvas samtempe la bezonon de tiu interkomprenilo kaj la praktikecon de tiu ĉi sistemo. La demando estos diskutata en Kembriĝo dum la Kongreso, kaj estas espereble, ke post nelonga tempo, ĉiuj Esperantistoj uzos la diritan sistemon, kiu estas bonega ekzemplo de la flankaj servoj, kiujn oni povas ricevi per Esperanto kaj deirante de la fruktodonaj principoj, laŭ kiuj nia lingvo estas konstruita.

Ni enmetas en tiun ĉi Non ekzempleron de la tabelo pri Helpa Mono, kiu estos utilega al niaj legantoj por la uzo de la dirita mono.

KONSULAJ INFORMOJ

Amiens (Francujo). — Esp. Konsuloj : S-ro Saquez, industriisto, 17, impasse des Saintes-Claires ; S-ro E. Searle, kastelo de Bontillerié.

Bourg (Ain-Francujo). — La sekretario de la Esp-Of. estas preta por doni letere aŭ buŝe informojn pri turismo, somerrestado en Jura montaro kaj pri la mirinde konata preĝejo de Brou (sendas vidajojn de tiu preĝejo).

Bradford (Anglujo). — Esperantista Konsulo de la grupo. A. Tuke Priestman, 12 Exchange Buildings-Bradford.

Châlon-s-Saône (Francujo). — Esperanto-Ofico : ĉe Mlle Blanchard, Bd de la République.

Chaux-de-Fonds (Svisujo). — Konsulo : S-ro Bourquin, r. Leopold Robert.

Dover (Anglujo). — Konsulo : J. M. Finey, Admiralty House.

Genève (Svisujo). — Esperanto-Konsulejo, 8, rue Bovy-Lysberg. Respondas senpage ĉiujn sciigojn pri la urbo kaj regiono. Oni nur aldonu poŝtmarkon por la respondo.

Hegi-Winterthur (Svisujo). — Socia-Informejo. S-ro Gustav Schwengeler, Esperanto-Ofico.

Le Creusot (Francujo). — Konsulejo, Esperanto-Oficejo, 20, place Schneider. Oni trovas en la oficejo ilustritajn poŝtkartojn de la fabrikejoj, sur kiuj la klarigoj estas esperante presitaj. Ĉiu merkrede je la oka vespere, esperantistaj interparoladoj ĉe la kafejo Morrot, rue d'Autun, en speciala ĉambro.

London. S. E. Hithergreen. — Konsulo : J. W. Baxter, Longhurst road 4.

Mâcon (Francujo). — S-ro Prunot, libristo, place de la Barre.

Parizo (Francujo). — Franclanda Esperantista Industria kaj komerca Societo. Por ĉiuj informoj sin turni al la sekretario S-ro A. Lefèvre, 23, rue Stephenson, Paris-18e.

Reims (Francujo). — Esperanto-Ofico. 5, place Royale (telefono 436), Chauvillon, libristo, konsulo. Liveras ĉiujn informojn, parole kaj letere, pri Reims kaj la regiono : turismo, komerco kaj esperantismo. Ricevas ĉiujn leterojn por la grupo esperantista de Reims (S. t. p. E.).

Roanne (Francujo). — Konsulo : S-ro Fortier-Beaulieu, 6, rue des Tanneries.

Romo (Italujo). — Esp-Konsulejo, Fotografia Dottarelli, 29 via Belsiana.

Roubaix (Francujo). — Konsulo : A. Denis, 86, rue du Moulin-Roubaix.

Seattle (Wash. Unuiĝitaj Statoj). — Esperanta Konsulejo, S-ro Ch.-E. Randall, zorgas pri ĉiaj aferoj, komercaj, sociaj, k. c. en Seattle kaj la Pacifika marbordo por la Esperantistaro.

St-Etienne (Francujo). — Esperanto-Konsulejo. — Taverne Alsacienne, place Marengo.

Valence (Francujo). — Konsulo : J. Delfour-kolegiestro.

Vesoul (Hte Saone-Francuja). — Konsulo : S-ro Maurice Girardet, negocisto, 1, rue de la Gare.

IIIa Kongreso Esperantista

Kembriĝo, Aŭgusto 12-17, 1907

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 10 Aŭgusto. — Lokaj ekskursoj kaj privataj akcepto-koncerto ĉe Guildhall.

Dimanĉon 11. — Angla Diservo, ĉe St-Mary's-Church, pastro Cyprian Rust. — Katolika Diservo en la katolika preĝejo, pastro Giambene, el Romo. — Konformisa Diservo, en Emmanuel Church, pastro W. B. Selbré.

La Diservoj estos farataj nur Esperante.

Lundon 12. — Naciaj kunvenoj. — Oficiala akcepto de D-ro Zamenhof per Mayor George Stace-Vizito de l'Muzeo kaj akcepto per la vickanceliero de l'Universitato vespere ; Oficiala malfermo de la kongreso en New Theatre ; parolado de D-ro Zamenhof kaj de la delegitoj.

Mardon 13. — Matene : Unua ĝenerala kunveno — Specialaj ekskursoj kaj akcepto en Garden City — Fagmeze : Kunvenoj de la specialfakaj grupoj. — Vespere : koncerto ; teatra ludo de « Boks kaj Koks ».

Merkredon 14. — Matene : Dua ĝenerala kunveno. — Tagmeze : Specialaj kunvenoj. — Ekskurso al Ely. — Parolado al ne-esperantistoj. — Vespere : Teatra festo ; ludo de « Bardell kontraŭ Pickwick», el Dickens.

Jaŭdon 15. — Matene : Tria ĝenerala kunveno. Tagmeze : Kunveno de la Internacia Scienca Asocio (Hall of the Union Society) — Vespere : granda ilumina festo en Fellow's Garden.

Vendredon 16. — Matene : Kvara ĝenerala kunveno. — Tagmeze : Ekskursoj ; specialaj kunvenoj. — Vespere : Granda festeno ; nacivesta balo en Guildhall.

Sabaton 17. — Matene : Solena ferma kunveno. — Tagmeze : Festo de la « Revuo ». Fermo.

***

La jenaj societoj kaj grupoj kunvenos dum la kongreso : Komercistoj, Dentistoj, Juristoj, Matematikistoj, Medecinistoj, Muzikistoj, Farmaciistoj, Presistoj, Edukistoj, Blinduloj kaj blindulamantoj, ŝakludistoj, tradukistoj de l'Biblio, Framasonoj, Pacifistoj, Maristoj, Militistoj, Ruĝa Kruco, Organiza komitato, Lingva komitato, Scienca Asocio, Konsuloj, Akciuloj de Esperanto, La Revuo, k. t. p., k. t. p.

Speciala Kongresa jurnaleto « La Tria » aperos dum la Kongreso (1 penco ; 4 Sd.).

***

Nia venonta No (27 Julio) enhavos plenan reporton pri la Kongreso.

***

Sur la vojo al Kembrigo

Ĉiuj Esperantistoj dezirantaj sciigojn dum sia restado en Bulonjo-ĉ/-Maro bonvolu sin turni al Esperanto-Oficejo, en Bulonjo. Oni respondos tuj ĉiujn leterojn.

En Bulonjo, sin turni al tiu Oficejo por ricevi la nomaron de la *Esperantistaj hoteloj* kaj ĉiujn informojn pri la vizito de l'urbo, la loĝejoj, la Grupo, k. t. p.

La juristoj bonvolu sin turni al la sekretariejo de la juristoj : 31, Bd Aug. Mariette. Fine, ĉiuj Esperantistoj dezirantaj resti en Bulonjo kelkan tempon post la kongreso skribu al la Esp-Oficejo, kiu plezure respondos iliajn demandojn.

INTERNACIA SOCIETO DE LA
ESPERANTISTAJ JURISTOJ

Oficiala Informilo

La *Internacia Societo de la Esperantistaj Juristoj* (I. S. E. J.) fondita dum la IIa kongreso esperantista havas celon krei kaj konservi inter siaj anoj aferajn rilatojn, konigi al la fremdaj juristoj la samideanajn kunfratojn aŭ jurlaborantojn en ĉia lando, ebligi la sendon de aktaro en la plej malproksimajn landojn, kun certeco trovi tie korespondanton, kiu parolas kaj skribas Esperante, unuvorte unuigi la Esperantistajn juristojn de ĉiuj landoj. Jam aliĝis anoj de pli ol 15 landoj.

La jara kotizajo kostas fr. 2,50 (1 spesmilo). ESPERANTO estas la oficiala organo de la I. S. E. J. kaj enpresas en ĉiu No la avizojn, kiuj koncernas ĝin. La anoj de la I. S. E. J. regule ricevas la jurnalon, sen plua pago.

Por ĉiuj informoj, sin turni al *S-ro Sergeant* sekretario, *31, boulevard Mariette, Boulogne-s-Mer* (Francujo), al kiu devas esti ankaŭ sendataj ĉiuj artikoloj, petoj de la anoj, novaj aliĝoj, k. t. p.

***

Avizo. — La dua ĝenerala kunveno de l'I.S.E.J. okazos **lundon 12an de Aŭgusto (5 horo)** en *Cambrige*, (Anglujo) en la Fiziologiejo de l'Universitato dum la tria Universala Kongreso de Esperanto.

La Esperantistaj juristoj, ĉeestontaj en Cambridge estas insiste petataj *apudesti* la kunvenon de la societo. Ilia ĉeesto neniel devigas ilin aliĝi al la societo.

Tagordo de la kunveno

1. Raporto de la Sekretario pri la financa, progresa, kaj societa stato de la Societo.
2. Raporto de S-ro Degon, franca vicprezidanto pri la prepara laboro de la vortaro speciala.
3. Disputado kaj voĉdono pri la regularo de l'I. S. E. J.
4. Diversaj proponoj pri la propagando.

Por ĉeesti la kunvenon, estos necese prezenti la membrakarton de l'I. S. E. J. Jaro 1906-1907.

***

Por ĉiuj komunikoj kaj proponoj, sin adresi dum la Kongreso al la Sekretario : 2, Free School Lane, *Cambdrige*.

La vicprezidantoj por Anglujo : S-ro Ellis John, solicitoro, kaj por Francujo : S-ro Degon, juĝakonfidato, loĝos dum la kongreso, samadrese, 2, Free School Lane.

La vicprezidanto por Skotujo S-ro W. M. Page, solicitoro loĝos dum la kongreso 5, Sussex Street.

ANONCETOJ

Kosto. 8 spesdekoj (20 centimoj, 2 pencoj, 10 pfenigoj) por ĉiu linio.

Rabato de 25 % por 6 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtos enpresigi 3 liniojn unufoje senpage.

Oni sendu al ni la anoncetojn antaŭ la 5 kaj 20 de ĉiu monato, aldonante la monon. Poŝtmarkoj estas akceptataj. Oni skribu plej legeble.

London (Anglujo). S-ro H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Road, deziras korespondi pri interŝanĝo aŭ aĉeto de malnovaj Esp. jurnaloj.

« Saturday Evening Tribune », la plej granda grava amerika ĉiusemajna jurnalo socialista, deziras esperantistajn korespondantojn en ĉiu lando pri la labora kaj socialista movadoj. Redone oni sendos la jurnalon. (En ĉiu No esperanta artikolo). Sin turni al Ch.-E. Randall, 1522 First Ave., Seattle, Wash. U. S. A. (Unuiĝitaj Statoj).

Parizo (Francujo). — Mi deziras interŝanĝi konversacion kun samideano loĝanta en Parizo kai parolanta regule. Skribi al B. C. 35. Bureau 1.

Anzin (Francujo). — S-ro François Henri, konsulo, Avenue de Condé, 117, liveras informojn pri scienco, librotenado kai meĥaniko.

Paris (Francujo). — S-ro Le Grignoux, 45, rue de l'Esperance, Paris-XIII, ĉiam respondos al ĉiuj poŝtkartoj de ĉinj landanoj. Petas precipe marbordajn vidindajojn.

Kamovn (Hungarujo). — S-ro F. J.). Macalik I. U. S., petas ĉiujn gesamideanjn sendi al li bildkartojn por helpi propagandon ; ĉiam respondos.

Düsseldorf (Germanujo). — La Esperantista grupo eldonis multkoloran bildkarton kun vidajo de sia kunvenejo. Ĉiu Esperantisto povas ricevi ĝin senpage adresante urbvidindajon al S-ro H. S. Hoen, Schützenstr. 61-I.

Paris (Francujo). — S-ro Masseron, 97, rue Alexandre-Dumas, Paris 20e, tre deziras koni la *nomojn de la komercaj ĉambroj, kiuj akceptis aŭ rekomendis la uzadon de Esperanto. Tre grava* por la propagando.

Prag-Zizkov (Aŭstrujo). — S-ro J. Jenĉ, Havliĉkova 37, deziras interŝanĝi vidajojn kun alilandaj gesamideanoj ; ĉiam respondos !

Plzen (Bohemujo-Aŭstrujo) — S-ro R. Sackmauer, fervojoficisto, Skretova ul 48, deziras korespondadi kun fremlandaj fervojoficistoj.

Falun (Svedujo). — S-ro H. Skog, studento, serĉas kunanojn por rondiranta manskribata gazeto, celanta reciprokan amuzon, havigon de bonega propagandilo kaj akiron de bona internacia stilo per interkorektado. Adr. N. Kyrkobacken, *Falum*, Svedujo.

Zürich III (Svisujo). — S-ro Karl Jost, Zwinglistr. 13, deziras korespondadi kun negermanaj Esperantistoj, precipe kun ekstereŭropanoj.

Beaune (Côte d'Or, Francujo). — D-ro A. Vesoux vendas je *moderaj prezoj* ordinarajn kaj *famajn vinojn*, kiujn li rikoltis.

Paris (Francujo). — S-ro Michaud, 13 Avenue de Saint-Mandé, tre deziras korespondi kun *inĝenieroj* pri konstruo de pontoj, tunelaj, fervojoj k. d. p. Li respondos al demandoj pri la Pariza Urbfervojo.

Praha II (Aŭstrujo). — S-ro A. Zahel, Táborská, 19, deziras interŝanĝi ilustr. kartojn kaj markojn kun ĉiuj gealilandanoj ; ĉiam tuj respondas !

Lausanne (Svisujo). — S-ro Thonney, R. du Tunnel, 8, deziras *riprezenti komercajn firmojn.*

Verdun (Meuse-Francujo). — S-ro Enauld, rue du St-Esprit deziras korespondi kun fremdaj gesamideanoj.

Verdun (Meuse-Francujo). — S-ro Adam, Agento de « Esperanto », 2, rue des Rouyers, deziras korespondi kun fremdaj gesamideanoj.

Blois (Francujo). — S-ro Raoul Oury, sekreriestro ĉe la Prefektejo, deziras korespondi kun gesamideanoj

Hamburg-Altona (Germanujo). — S-ro Th. Rolofl, 32, Bahnhofstr. deziras aĉeti belan *buldoghundon.* Oni sendu bildon postulante la prezon.

La Guardia (Jaén-Hispanujo). — S-ro S. Baudin Agüero deziras korespondi kun ĉiulandaj *geinstruistoj* pri *pedagogio.*

Tailiette-Rocroi (Ardennes-Francujo). — S-ro Heripret deziras korespondi pri *vivado de terlaboristoj* kun *svedoj* kaj *angloj.*

Arsonval p. Bar-s-Aube (Francujo). — S-ro R. Dousset deziras korespondi poŝtkarte kaj letere kun ĉiulandaj gejunuloj.

Lyon (Francujo). — Junulo dudeksesjara deziras *edziĝi* kun komercema kaj vojaĝema Esperantistino ; li konigos sian celon kaj intencojn, konigante sian nomon kaj adreson al ĉiu skribintino al : Livret Caisse d'Epargne no 269.135, 140 poste restante, Lxon Grolée.

Oni estas petata skribi nur seriozeme.

Hanau a/ M. (Germanujo). — S-ro Chr. Stoll, prezidanto de la E. G. deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun neeŭropaj geesperantistoj.

Hanau a/ M. (Germanujo). — S-ro Oscar Müller, sekretario de la E. G. deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun neeŭropaj gesamideanoj.

LIBRAIRIE HACHETTE & Cie
Boulevard St-Germain, 79, PARIS

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto en lingvo Esperanto

redaktata kun la konstanta kunlaborado de

Dro L. L. ZAMENHOF

kaj de eminentaj esperantistoj de ĉiuj landoj
48 paĝoj da plej bona teksto
in-8, ĉiumonate !

Jara Abono

Francujo. . . . Fr. 6 | Ceteraj landoj. Fr. 7
Unu numero : 50 centimoj.

LINGVO INTERNACIA
Centra Organo de la Esperantistoj
eliranta la 15-an de ĉiu monato
La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895

ADMINISTRACIO :
Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris
JARA ABONO :
Sen Literatura Aldono 5 fr. — Kun Aldono 7 fr. 50
Specimena numero estas senpage ricevebla

PROPAGANDA MARKO ESPERANTA

Tre taŭga propagandilo, Bela bileto presita en kolora ruĝa kaj verda : ĝi prezentas terglobon metilan sur la mezo de l'kvinpinta stelo, kun esperanta surskribo. Tiuj ĉi markoj estas difinitaj por esti algluigitaj sur la korespondajoj.

Prezo : milo, 6 spesmiloj ; cento, 75 spesdekoj ; deko, 13 spesdekoj, afrankita por privatuloj. **Milo, 1,50 spesmilo por societoj, konsulejoj, oficejoj, k. t. p.** Sin turni al **R. Felser,** Klosterwiesg, 46, **Gratz** (Aŭstrujo).

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO
ESPERANTISTEN
"ESPERANTO"

Månadsskrift på Esperanto & Svenska. Pris kr. 2:50. Provn-r mot 4 öres porto från.

Expeditionen : 4 Karduansmakareg., Stockholm 1 (A. T. 18210).

Redaktör : P. Ahlberg, sekreterare i *Svenska Esperanto-Förbundet & Stockolms Esperanto-Förening.*

Redaktion & Sekretariat : 37, Surbrunnsg. Stockholm, 6 (Allm. tel. 21822).

Förteckning över **Esperantolitteratur**, **Stadgar** för såval förbundet som Stockholmsföreningen sändas mot 4 öres porto från sekretariatet i Stockholm.

PROJEKTO PRI INTERNACIA HELPA MONO
de René de Saussure

liveras plenajn klarigojn pri la celo kaj utileco de internacia helpa mono por la Esperantistoj.

Dekdupaĝa broŝureto aĉetebla po **20 spesdekoj** (paĝeblaj poŝtmarke) ĉe **ESPERANTO-JURNALO.**

NOVAJ ESPERANTISTAJ POSTKARTOJ

kun tabelo montranta la valoron de la diversaj naciaj moneroj rilate kun ilia responda valoro en internacia helpa mono. PREZO : 30 spesdekoj po 20 ekzempleroj, 1 spesmilo po 100 ekzempl.

Riceveblaj ĉe **ESPERANTO-JURNALO**, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève (Svis.). Poŝtmarkoj estas akceptataj ĝis 1 spesmilo.

Monata kroniko

Julio 1907.

Kune kun la somero alblovas trankvila venteto super la politika tumultado. La Parlamentoj malfermiĝas, ministroj kaj deputatoj prepariĝas por forperdiĝi en pli trankvilajn kaj sanigajn regionojn. Sed dum tiu tempo, sole la Haga Konferenco ne interrompas siajn kunvenojn. Komisiitaroj kaj subkomisiitaroj, delegitoj kaj subdelegitoj ŝajnas ageme laboradi ; pri tiu laborado instruas nin, nur en mallonga kaj forloga formo, la gazetaj raportetoj, kiuj verŝajne ne ekscitas la atenton kaj scivolon de multnombraj legantoj. La maltrankviloj kaj antaŭtimoj, kiujn komence elvokis tiu Konferenco, nun forpasis, kaj la eminenta diplomataro kunvenadas kaj laboradas meze de granda indiferenteco. Tio ĉi cetere ne signifas, ke ĝi ne povos realigi kelkajn plibonigojn en la internaciaj rilatoj dum militado, sed pli malproksimem ĝi certe ne iros.

En Francujo, la suda movado ankaŭ ekdormas, kvankam la striko de la ŝtatoficistoj ankoraŭ daŭras, sed oni antaŭvidas, ke ĝi baldaŭ finiĝos, ĉar el ĝi rezultas nur pli grava konfuzo en la vivado de la sudaj regionoj. La Parlamento disiĝis kaj la ministraro nun havas kelkajn semajnojn de certa vivo.

Italujo nun havas sian aferon Nasi. La eksministro, kulpigita pri malhonesteco dum sia ministrado, estis neatendite arestita. Granda bruado rezultis de tio en Sicilio kaj Suda Italujo, kie Nasi estas kvazaŭ idolo. En Italujo kiel en Francujo, la sudaj regionoj kontraŭbatalas la centran regnestraron kaj alprenas apartan provincan politikon. Kelkajn tagojn antaŭ tiu okazintajo, tuta Italujo festis la centjaran datrevenon de sia heroo Garibaldi, kiu rememorigas pri glora epoko. La renkontiĝo inter ambaŭ ministroj de eksterlandaj aferoj de Aŭstrujo kaj Italujo estis ankaŭ rimarkita. Italujo havas kun Aŭstrujo diversajn komunajn punktojn pro sia najbareco, nome la demando de Itallingva Aŭstrujo (Triesto kaj Ilirio) kaj Albanujo-Makedonujo, al kiu Italujo havas iajn pretendojn. Malgraŭ la oficiala kunligo, la rilatoj inter Aŭstrujo kaj Italujo ne ĉiam estis plene konsentaj ; tamen la kunligo persistas, pli longe ol oni supozis, kiaj ajn estas la naturaj emoj de la Itala popolo al Francujo kaj Anglujo.

Rusujo, kiu antaŭe okupadis la tutan atenton, estas en provizora trankvileco. La forpermeso de la Dumo trafis nur indiferentecon de la plej multaj kaj kun tia sama sento la Rusa popolo atendas la balotadon de la venonta tria Dumo, kiu cetere ne estos la Dumo de la Rusa popolo, sed nur de tre malgranda frakcio.

En Portugalujo ankoraŭ regas agitado sekve de la diktatoreco de ĉefministro Franco. El tiu lando venas al ni plej diversaj opinioj pri la reala situacio. Tie ĉie kiel en multaj landoj, la Parlamenta sistemo estas nur kovro de ĉiaspecaj intrigoj de la partioj, kiuj deziras anstataŭigi sin unu per la alia por pure partia profito.

En malproksima Azio, kvazaŭ malaperis imperio el la geografia karto. Jam de la rusa-japana milito, Koreujo estis fakte sub la potenco de Japanujo. Por protesti kontraŭ tia situacio, la regnestraro sendis al la Haga konferenco korean delegitaron, kiu cetere ne sukcesis elvoki la kompaton aŭ justemecon de la tutmonda diplomataro. De tia faro, sekvis granda kolero de Japanujo, kiu ordonis aŭ forte konsilis, ke la imperiestro demetu la regnestrecon kaj fordonu ĝin al sia filo. Tion li faris malvolonte, kaj sekvis tumultoj en la ĉefurbo de l'Trankvilsuna lando, kiu sendube fariĝos tute Japana dependajo. Japanujo nun havas kvazaŭ propran teron sur la Azia kontinento dum Hinujo edukita de siaj najbaraj samrasanoj, iom post iom vekiĝas el sia jarmila dormado. Kiel malgravaj kompare kun tiaj simptomoj estas la intrigoj kaj malgrandaj kombinoj de la Eŭropa politiko !

A. R.

FELIETONO DE " ESPERANTO " 6

LA LEGENDO
DE
SANKTA JULIANO HELPEMA

el Gustave FLAUBERT

(trad. H. Hodler)

Kiam li estis apude, li por kisi sian edzinon kliniĝis super la kusenon sur kiu ripozadis du kapoj unu apud la alia. Tiam li sentis sur sia buŝo kvazaŭ estus barbo. Li reenpaŝis, freneziĝis ; sed li reiris al la lito, kaj lia fingroj palpe renkontis tre longajn harojn. Por konvinkiĝi pri sia eraro, li per la mano malrapide tuŝis la kapkusenon. Tie estis ja barbo, tiun fojon, kaj viro ! viro kuŝanta kun lia edzino ! Incitata de kolerego, li frapegis ilin per ponardo ; kaj li piedbatis, elkraĉis, kun blekoj de sovaĝa besto. Fine li haltis. La mortintoj, pikitaj ĉe l'koro, eĉ ne moviĝis. Li atente aŭskultadis iliajn preskaŭ egalajn stertorojn, kaj, dum ili mallaŭtiĝis, alia tre proksime ilin ripetadis. Unue necerta, tiu plendema longa voĉo alproksimiĝis, laŭtiĝis, krueliĝis, kaj terurigita li rekonis la blekon de l'granda nigra cervo. Kaj dum li rerigardis, li kredis vidi, ĉe la kadro de l'pordo, la fantomon de sia edzino, kun lumo en la mano. La bruo de l'mortigo ŝin altiris. Per sola rigardo ŝi ĉion komprenis, kaj, timigita, ŝi forkuris ellasante la flamingojn. Li ĝin prenis. Antaŭ li, liaj gepatroj kuŝadis sur la dorso, kun truo en la brusto, kaj iliaj vizaĝoj majeste dolĉaj, ŝajnis konservi eternan sekreton. Elŝprucoj kaj marĉoj de sango montriĝis meze de ilia blanka haŭto, sur la litotukoj, tere, ĉe elefantosta kristo alpendigita en alkovo. La skarlata rebrilo de l'vitrajo, tiam trafata de l'suno lumigis tiujn ruĝajn makulojn, kaj ilin dismultigis en la apartamento. Juliano paŝis al la du mortintoj, dirante, volante kredi, ke tio estas neebla, ke li eraris, ke kelkafoje ekzistas neklarigeblaj similajoj. Fine, li iomete malstariĝis por vidi proksime la maljunulon ; kaj li ekvidis, inter liaj duonfermitaj palpebroj pupilon kiu lin bruligis kiel fajro. Kaj li iris al la alia flanko de l'lito, okupita de la alia korpo, kies vizaĝon parte malkaŝis blankaj haroj. Juliano plektis siajn fingrojn sub ŝiaj harbanderoloj, levis la kapon ; kaj li rigardis ĝin, tenante ĝin en la fino de sia rigidigita brako, dum li per la alia mano tenis la flamingon. Gutoj defluetis el la matraco, unu post unu faladis sur la plankon. Ĉe la fino de l'tago, li prezentiĝis al sia edzino ; kaj per ŝanĝita voĉo, li ordonis, unue ke ŝi al li ne respondu, lin ne proksimiĝu, lin eĉ ne rigardu kaj ŝi obeu, sub Inferpuno, ĉiujn liajn neŝanĝeblajn ordonojn. La funebroj devis esti faritaj, laŭ la ordonoj, kiujn li skribis kaj lasis sur Dipreĝilo, en la ĉambro de la mortintoj. Li fordonis al ŝi la palacon, la vasalojn, ĉiujn siajn bienojn, eĉ ne esceptante la vestojn de sia korpo kaj siajn sandalojn, kiujn oni trovos sur la supro de l'ŝtuparo. Okazigante lian krimon, ŝi obeis la volon de Dio kaj ŝi preĝu por lia animo, ĉar li de nun jam ne ekzistos.

Oni solene enterigis la mortintojn en la preĝejo de monaĥejo, je tri tagoj de l'kastelo. Post la sekvantaro, malproksime de ĉiuj aliaj, iris monaĥo vestita per robo kaj al li neniu kuraĝis paroli. Li dum la meso restadis sur la ventro, meze de l'perono, kun la brakoj krucumitaj kaj la frunto en la polvo. Post la entombigo, oni vidis, ke li sekvas vojon kondukantan al la montoj. Li multafoje rerigardis kaj fine malaperis.

III

Li foriris, almozpetante sian vivadon tra la mondo. Li prezentis la manojn al la rajdantoj sur la stratoj, kun genufleksoj alproksimiĝis la rikoltistojn aŭ restadis senmova antaŭ la baroj de l'ĉasejoj ; kaj tiel malgaja estis lia vizaĝo, ke al li oni ĉiam fordonis almozon. Pro humileco, li rakontadis sian historion, tiam forkuris ĉiuj, signante la krucon. En la vilaĝoj kie li jam pasis, tuj kiam li estis rekonita, oni fermis la pordojn, oni kriis minacojn, oni ĵetis al li ŝtonojn. La plej donemaj metis pladon sur la bordon de sia fenestro, kaj fermis la tegmenteton por ne ekvidi lin. Forpelita el ĉie, li evitadis la homojn kaj sin nutradis per radikoj, plantajoj, perditaj fruktoj kaj konkoj, kiujn li serĉadis laŭ la marbordoj. Kelkafoje, ĉe l'konturo de monteto, li sub la okuloj vidis konfuzajon de premitaj tegmentoj kun ŝtonaj turoj, pontoj, nigraj interkruciĝantaj stratoj, el kie alflugis al li senĉesa zumado. La bezono partopreni en la vivado de l' aliaj lin instigis malsupreniri urben, sed la besta ŝajno de l'vizaĝoj, la bruado de l'stabloj, la indiferenteco de l'paroloj glaciigis lian koron. La festotagojn, kiam tuj de l'matenruĝo la sonorilo de l'preĝejoj ĝojigadis la tutan popolon, li rigardis la urbanojn elirantajn el la domoj, kaj la dancojn sur la placoj, la fontanojn de biero ĉe la vojkruciĝoj, la damasajn tapetojn antaŭ la loĝejo de l'princoj, kaj ĉe la vesperiĝo, tra la vitrajo de l'teretaĝoj, la longajn familiajn tablojn, ĉe kiuj avoj luladis nepojn sur siaj genuoj ; lin sufokis plorego, kaj li reiris al la kamparo. Li kun amo rigardadis la ĉevalidojn sur la herbejoj, la birdojn en la nestoj, la insektojn sur la floroj ; ĉiuj, ĉe lia alproksimiĝo, forkuris, kaŝiĝis timigitaj, rapide forflugis. Li serĉadis la solejojn. Sed al lia orelo la vento alportadis kvazaŭ stertorojn de agoniantoj ; la rosaj larmoj teren falantaj rememorigis lin pri aliaj gutoj pli pezaj. Ĉiuvespere, la suno sternis sangon en la nuboj ; kaj ĉiunokte, en sonĝo, rekomenciĝis lia patromortigo. Li faris al si harveston per ferpintoj. Li genue surrampis ĉiujn montetojn, kiuj havas kapelon sur la supro. Sed la senkompata penso mallumigis la brilon de l'tabernakloj, lin turmentegis tra ĉiuj suferoj de l'pentofaro. Li ne ribelis kontraŭ Dio, kiu lin instigis al tia ago, kaj tamen senesperiĝis, ke li povis ĝin fari. Li tiel hontis pri sia propra persono, ke li, esperante sin liberigi de ĝi, sin elmetis en danĝeroj. Li el bruladoj savis parazitojn, el la abismoj, infanojn. La abismo lin elĵetis, la flamoj lin indulgis.

La tempo ne paciĝis lian suferadon. Ĝi fariĝis netolerebla. Li decidis morti. Kaj tagon, kiam li troviĝis ĉe l'bordo de fontano, kliniĝante super ĝi por vidi la profundecon de l'akvo, li vidis aperi maljunulon, tute malgrasan, kun blanka barbo kaj tiel mizera elŝajno, ke li ne povis forteni siajn plorojn. La alia ankaŭ ploris. Ne rekonante lian figuron. Juliano malklare rememoris pri vizaĝo simila al tiu ĉi. Li ekkriis : ĝi estis lia patro ; kaj li jam ne pensis pri sia memmortigo.

Tiele, kunportante la pezon de la rememoro li travojaĝis multajn landojn ; kaj li alvenis apud riverego, kie transirado estis malfacila, ĉar ĝi estis furioza kaj sur la bordoj troviĝis vasta sternajo de ŝlimo. Jam de longatempe, neniu kuraĝis ĝin transpasi. Malnova barko, ensabligita ĉe la posta parto, starigis sian antaŭon en la kanoj. Juliano, ekzamenante ĝin trovis paron da remiloj ; kaj al li venis la ideo uzi lian vivon por servi al la aliaj.

(Daŭronta).